

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE S.A.T.

<http://www.satesperanto.org/> *** retadreso: satesperanto@free.fr

MALANTAŬ BELA KIMONO, KIA REALECO ESTAS EN INDUSTRIO?

VIDU PAĜOJN DE "SAT-KULTURO"



“Juzen estas japana metiarto tre malnova kaj historiĉa. La teknikoj priskribitaj en la lastaj paĝoj estas delikataj kaj kompleksaj. Ili necesigas koloran reproduktion. Vi ankaŭ trovos meze de tiu gazeto pli ampleksan tekston kiu respondos al ĉiuj viaj demandoj. Bonegan legadon!”

SAT-ANOJ KUTIMIĜU AL EKSTERNACIA SENT-, PENS-, KAJ AGADKAPABLO! LANTI

Decembro 2006 77-a jaro, n-ro 12 (1218)

MENSUEL / MONATA

ISSN 1163.0442 Prezo: 5 €





PAC-AGADO Pacista Frakcio de SAT

« M 51 »

Hodiaŭ : Malŝparado Morgaŭ : Danĝero

La 9-an de novembro 2006, franca armeo efektivigis la unuan pafon de misilo « M51 ». Tiu nova strategia



Unua pafo de misilo « M 51 »

misilo estis propulsita de la « Centro de provoj kaj de pafoj de misiloj » (CELM). Tiu centro situas en sudokcidento de Francio ĉe la bordo de Atlantika Oceano. Ĝia surfaco estas 15 000 hektaroj ; ĝi okupas 28 kilometrojn de marbordo ; estas malpermesite eniri en ĝi. Laŭ niaj informoj, la misilo pezus 51 tunojn, kaj havus trafdistancon ĉirkaŭ 10 000 kilometroj. La plej granda parto de la trajektorio de misilo efektiviĝas ekster la tera atmosfero. La misilo, kiu estis pafita de la franca Centro (CELM) falis apud la brazila marbordo. Dum la provoj la misiloj estas nearmataj (t.e. la misiloj ne entenas nukleajn kapojn). Tiu misilo « M 51 » armos, en 2010, la 4 francajn submarŝipojn-misilpafilojn. Ĉiu submarŝipo estos ekipata per 16 misiloj kaj ĉiu misilo entenos 6 nukleajn kapojn.

Malŝparado

– Dum la operacoj la submarŝipoj eventuale povus elfjeti misilojn do, la Centro de provoj (CELM) konstruis, por la provoj, grandegan basenon profundan je 50 metroj. En tiu baseno estas aparato, kiu, kiel en la submarŝipoj, elfetas la misilon

ekster la akvon, antaŭ ol la motoroj de misilo ekfunkcias. Dum provo, la misilo evitu aviadilojn, satelitojn, ... Do, provo postulas multajn antaŭzorgadojn. Ĝis 2010, franca armeo planis dekon de provoj de « M 51 ».

La kosto de studadoj, konstruoj de prototipoj, provoj, estas 5,7 miliardoj da Eŭroj. La produktado de « M 51 » kostos ĉirkaŭ 3 miliardojn da Eŭroj.

Danĝero

– Respondeculoj de franca Oceana Strategia Atomarmilaro diskutas la eblecon eksplodigi nukleajn kapojn de misilo « M 51 » je la altitudo de 20 kilometroj. Laŭ ili, la eksplodoj je tiu altitudo malpliigus la radiadojn, kaj detruus la komunikojn. Franca armeo, kaj sendube aliaj armeoj, preparas « belajn tagojn » por homaro !



Leĝpropono n-ro 271

Ni reagu

– Jes ! Sed kiel ? Ekde kelkaj jaroj, Francio ĉiujare elspezas ĉirkaŭ 3 miliardojn da Eŭroj por sia atomarmilaro. En 2007, la Francoj elektos Prezidanton de la Respubliko, tio


estus okazo por elekti Prezidanton, kiu komencus malarmadi. Bedaŭrinde, ĝis nun, neniu kandidato proponas politikon de malarmado.

Ni opinias ke SAT-anoj komencu debati pri la temo. Ni rememorigas ke ni estas por « Unuflanka Malarmigo » de Francio. (Antaŭ kelkaj jaroj, 5 francaj socialistaj gesenatanoj metis, ĉe Senato, la Leĝproponon n-ro 271, kiu antaŭvidas progresivan malarmadon ĝis totala malarmado. Ni detale prezentis tiun Leĝproponon kaj ni proponis agojn en Sennaciulo n-ro 1177/1178 de julio-aŭgusto 2003).

Colette Weiss / André Weiss

MONATO DE E-LIBRO

<http://www.satesperanto.org/-Librovendejo-.html>





Karaj, venis momento ke post 24-jaroj de seninterrompa redaktado kaj produktado de 295 numeroj de nia organo

Sennaciulo, mi transdonu la torĉon al la nova redakta skipo kiu estas preta daŭrigi mian laboron kaj produkti tute novan, freŝan, pli modernan kaj pli maldekstran gazeton. Ili certe povas daŭre kalkuli pri mia helpo kaj subteno.

Do, antaŭ 24 jaroj, en aprila numero de 1982 aperis la simila teksto en kiu mia kamarado kaj amiko, Norbert Barthelmess, transdonis al mi la redaktadon de Sennaciulo. Li daŭre restis redaktanto de Sennacieca Revuo (vidu la foton). En tiu tempo la kompostado kaj presado de Sennaciulo estis farata de la presisto en Rotterdamo. Pro la fakto ke mi ne parolas la nederlandan lingvon, rekta kontakto kun la presisto ne estis ebla. En tio helpis al mi nia forpasinta kamarado Quispel. La engaĝiglaboro estis farata laŭ la klasika maniero per tranĉado, gluado kaj produktado de la maketo kiun poste la presisto mem realigis.

Asocia sidejo de S.A.T., administrado kaj redakto: 67, avenue Gambetta, FR-75020 Paris, tel. +33.1.47.97.87.05, telekopiiilo: +33.1.47.97.71.90.

Retadreso: satesperanto@free.fr.

TTT-paĝoj: <http://satesperanto.free.fr>

Oficejo malfermita: lunde de 9h30-15h30; de mardo ĝis vendredo: 9h30-16h30. Ekster la laborhoroj funkcias aŭtomata registriilo.

Poŝtkonto: SAT n° 1234-22 K, Paris.

IBAN: FR 77 30041 00001 0123422K020 39

BIC: PSSTFRPPAR

Konto de SAT ĉe UEA : **satx-s**

Redaktas: Redakta Komitato - P. Lévy, G. Rollin, Viola, C. Orsingher, Snajpero, I. Močilnik kaj K. Barkoviĉ.

Ĉefredaktoro : Kreŝimir Barkoviĉ

Ekspedejo de Sennaciulo: adreso de la redakto. Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Ricevitajn manuskriptojn oni ne resendadas. La limdato de ricevo de manuskriptoj estas la 10-a de kuranta monato.



Imprimé par : TROISA, 4 rue Théodule Ribot, FR-75017 Paris.

Aperas monate - Mensuel.

Le directeur de la Publication: Jacques BANNER

Abonnement annuel/jara abono France 55 €.

Autres pays/aliaj landoj : peti la tarifon de nia peranto aŭ de la SAT-Centro.

Dépot légal à la date de parution.

N° CPPAP 0510 G 86567

Limdato por ricevo de kontribuajoj estas ĉiam la 10-a en la monato.

BONVENIGO AL LA NOVA REDAKTA SKIPO

Bonvenigo al nova redaktoro

Post pli ol duonjarcenta prizorgado de nia SAT-organo „SENNACIULO” mi transdonas fide kaj ĝoje mian postenon al mia kara kolego kaj amiko, K-do Kreŝo Barkoviĉ, membro de P.K. de SAT. Mi estas certa, ke li plenumos la postulatan laboron konsciencie kaj kompetente; cetere mi plue restas disponebla por helpi la novulon, por ke li havu apogon ĝis plena spertiĝo. Krome mi restas la redaktoro de "Sennacieca Revuo" (jara kajero).

Tiuokaze mia voko iras al ĉiuj kunlaboremaj SAT-membroj, kiuj havas la kapablon verki ion interesan kaj konforman al nia spirito, ke ili sendu siajn artikolojn kaj komentojn senhezite al la redakto en la Avenuo Gambetta. Vi faciligos la redaktoran laboron, tajpante nur unuflanke de folio (tio validas ankaŭ por manuskriptoj), lasante blankan marĝenon por povi eventualajn korektojn, kaj kooperante por ke la nivelo de nia gazeto restu alta kun originaleco.

Kun freŝa kuraĝo antaŭen!

N. Bartelmes

En la jaro 1988 SAT aĉetas sian unuan komputilon - Macintosh SE, kun malgranda ekrano kaj tiam ankoraŭ neebla uzo de E-literoj. Kun entuziasmo mi memlernis la uzon de tiu moderna ilo, de novaj programoj por prepari min al nova tasko engaĝigi mem nian gazeton. Intertempe ni mendis ĉe iu entrepreno la fabrikadon de E-litertipoj. La engaĝigo ne estis facila ĉar la ekrano estis malgranda kaj oni devis "navigi" sur la paĝo A4 por engaĝigi parton post parto. La unua numero de la de mi mem engaĝigita Sennaciulo aperis en januaro 1989 (vidu bildon). Evidente, ĝi estis ne tre bela kaj sukcesa, tiel ke la PK petis la membrojn pri toleremo kaj pacienco por ke la redaktoro havu tempon spertiĝi kaj plibonigi la kvaliton. Intertempe la komputiloj evoluis kaj ankaŭ la spertoj de la redaktoro. Ankaŭ ni ŝanĝis la presiston kiu nun troviĝis en Francio kaj kun kiu la kontaktoj estis pli facilaj.

La aspekto de nia gazeto kaj la preparmaniero ankaŭ evoluis. Aperis difinitaj rubrikoj kaj ankaŭ rubrikredaktoroj. En tiu momento ŝanĝiĝis mia posteno en la kofono. Pro la fakto ke nun ekzistis kelkaj rubrikredaktoroj mi iĝis ĉefredaktoro. Post la Bratislava kongreso, la unua postkongresa numero denove aperis en nova aspekto. Sennaciulo aperis kolora kun kvar koloraj paĝoj kiujn ni povis havi

por la sama prezo, ŝanĝante denove presiston. Tia ĝi estas ĝis hodiaŭ. B e d a ŭ r i n d e , malgraŭ ĉiuj tiuj ŝanĝoj kaj plibonigoj, ni ne sukcesas altiri novajn membrojn. Pluraj el niaj membroj opinias ke nia gazeto ne estas sufiĉe moderna kaj sufiĉe maldekstra por la junaj generacioj. Ni esperu ke la nova skipo sukcesos per nova Sennaciulo ŝanĝi tiun situacion.

Nun restas al mi danki al ĉiuj membroj de SAT kaj al ĉiuj legantoj de Sennaciulo pro bona kunlaboro dum tiuj 24 jaroj. Bonvolu nepre daŭrigi sendon de viaj



kunlaboraĵoj al la nova skipo ĉar ili daŭre bezonas materialon. Ja, la veraj redaktoroj estas vi mem. Mi deziras al ĉiuj grandan sukceson. Antaŭen por la bono de SAT kaj Laborista E-Movado.

Via ĝis-nuna redaktoro, Kreŝo

MEMORKUNVENOJ

Ĉiujare je la 1-a de novembro la Asocio de Persekutitoj de l'Nazi-reĝimo - Unio de Antifaŝistoj (Vereinigung der Verfolgten des Naziregimes - Bund der Antifaschisten [VVN-BdA]) okazigas memorkunvenon antaŭ la tombmemorejo por 235 Aŭgsburgaj nazi-viktimoj mortigitaj en koncentrejoj inter 1933 kaj 1945. Parolis 73-jaraĝa Ernst Grube, kiu sukcesis supervivi holokaŭston kiel infano en koncentrejo Theresienstadt (tereziensztat - Terezín / Ĉeĥio). Dek parte maskitaj personoj, nigre vestitaj, alproksimiĝis, fotis la proksimume 60 partoprenantojn kaj ĝenis la kunvenon. Kelkaj de la partoprenantoj, inter ili du senuniformaj policistoj, intervenis. La dekstruloj uzis piproŝprucilojn kaj bate perfortis la antifaŝistojn. Kun helpo de la du policistoj oni sukcesis kapti unu el la novnazioj. 17 Policveturiloj kaj eĉ helikoptero malkovris



Memorkunveno en Augsburg

kelkajn de la fuĝintaj ceteraj dekstruloj. Entute sep dekstruloj estis kaptitaj kaj mallongtempe arestitaj. Ili jam delonge estas konataj. Nun ilin atendas akuzo - espereble.

Malgraŭ ke ĵurnalistino persone ĉeestis la gazeto ne raportis la veron, sed skribis ke estis perforta kverelo inter dekstruloj kaj maldekstruloj. Kaj la urbaj instancoj, sub gvido de socialdemokrata urbestro, malpermesis partoprenon je la sekva memorkunveno ne nur al novnaziuloj sed ankaŭ al la antifaŝista VVN-BdA (vidu supre)...

Kelkajn tagojn poste, la 5an de novembro, kiel tradicie estis memorkunveno en koncentrej-memorejo Dachau (daŭaŭ). Parolis la estinta ambasadoro en Israelio, Rudolf Dreßler (dresler), socialdemokrato, kaj ĉeestis d-ro Max Mannheimer (maks manhajmer), estro de la asocio de estintaj koncentrej-anoj, kaj eĉ la prezidantino de la »Zentralrat der Juden in Deutschland« (centralkonsilio de judoj en Germanio), Charlotte Knobloch (ŝarlote knobloĥ), pluraj politikistoj kaj - nekredeble kaj hontinde - nur kelkaj manplenoj da partoprenantoj, ĉefe sindikatanoj. Entute estis apenaŭ cent homoj, kiuj publike memoris la nokton de pogromo en 1938 inter 9^a kaj 10^a novembro.

Aliloke okazis kontraŭaj memorkunvenoj: En Frankfurt / Oder (Brandenburg / Germanio) tuj post la oficiala memorkunveno novnaziaj dekstruloj malhonore detruis memorŝtonon ĉeloke de iama sinagogo, distretis florbukedojn kaj kriaĉis naziparolojn kiel »Sieg Heil«. Ankaŭ tie la polico agis senhezite kaj arestis la krimulojn, kiuj nun estas akuzataj. Ĉefurbestro Martin Patzelt publike deklaris:

“Dum jaro post jaro ĉiam pli ge-Frankfurtanoj troviĝas ĉe la memorŝtono por memori pri niaj persekutitaj kaj murditaj judaj civitanoj, nun kelkaj agis honte. Mi partoprenas la indignon de la

plimulto de niaj gecivitanoj pro tia ago. Tio ne rilatas al niaj sentoj kaj pensoj, ĝi estas abomeninda.



Rudolf Dreßler en KZ-memorejo Dachau

La malpia okazintaĵo de hieraŭ vespere bedaŭrinde montras, ke en kelkaj kapoj ankoraŭ estas antaŭjuĝoj kaj malamo, kiuj kondukas al eksplodoj de perforto. Hieraŭ estis perforto kontraŭ objektoj, tio rapide povas sin ŝanĝi en perforton kontraŭ homoj.

Tion ni ne volas, tial ni devas civitane aktiviĝi.”

Ministroprezidanto Matthias Platzeck (matias platsek) akre kondamnis la fiagon de novnaziuloj ĉe la memorŝtono pri la pogromnokto...



Polica helikoptero serĉas novnaziulojn

La okazintaĵoj montras kiom malice kaj kun klara celo la dekstra kanajlaro provas provoki.

“Estas netolerebla provoko. Mi sentas hororon. Kiu

ekatakas florbukedojn kaj kandelojn memorigantajn pri milionoj da viktimoj de holokaŭsto, tiu montras ke li nenion lernis el la plej granda katastrofo en germana historio. Tiajn ekscesojn ni ne rajtas akcepti en Brandenburgo. Kontentigas min, ke polico kaj prokuroro agis senhezite.”

Tamen: Kvankam ĝis 25% de la loĝantoj kelkfoje montras maltoleremon, kaŝan rasimon, nacian egoismon k. s., la plejparto de la homoj sintenas demokrate kaj honeste. Kaj vere tio ne estas fenomeno nur en Germanio; ĉie en la mondo troviĝas nacia egoismo, naciismo, maltoleremo kaj senhomeca malamo.

Fakte, samtempe ĉiuj partioj en urba parlamento akre protestis kontraŭ kunveno de novnazia partio NPD (Nationaldemokratische Partei Deutschlands) en Berlino. Urbestro Klaus Wowereit (voverajt, SPD) same kiel estro de CDU-frakcio Friedbert Pflüger (fridbert pfliger) postulis malpermeson de tiu partio.

Jomo IPFELKOFER
Augsburg / Germanio (32394)

Sennaciulo, decembro 2006

BUDAPEŝTO 1956 -2006

TRAGEDIO KONDUKIS AL PROKSIMIĜO DE DU POPOLOJ

Kvindek jarojn post la Hungara Revolucio oni memoris pri la eventoj kaj la akcepto de 14 000 rifuĝintoj en Svisio. La hungara popolleviĝo prepariĝis jam en la jaro 1955 per liberaj diskutoj pri politikaj temoj en la aŭlo de la Teknika Universitato en Budapeŝto post konatiĝo de la sekreta parolado de Ĥruŝčov pri la krimoj de Stalino. La 23an de oktobro 1956 malgranda manifestacio de studentoj en Budapeŝto rapide kreskis ĝis amaskunveno protestanta kontraŭ la komunista reĝimo kaj postulanta liberan opiniesprimon, liberajn elektojn kaj sendependecon de Sovetio. La samon postulis manifestacioj en aliaj hungaraj urboj. La ŝtata sekureca polico intervenis per armiloj kontraŭ la manifestaciantoj inter kiuj troviĝis ankaŭ dekmiloj da laboristoj ne kontentaj pri siaj malbonaj vivkondiĉoj. Soldatoj kaj policianoj simpatiis kun la ribelantoj kaj transdonis al ili siajn armilojn.

BATALOJ KONTRAŬ TANKOJ

La 30an de oktobro 1956 la ĉefministro Imre Nagy proklamas, post la eksigo de la antaŭa registaro, la reenkondukon de la plurpartia sistemo, la neŭtralecon de Hungario kaj la ekŝigon de Hungario el



la Varsovia Pakto. Sed la 4an de novembro János Kádár anoncas ĉe la radio la fondon de « Hungara revolucia registaro de laboristoj kaj kamparanoj » kaj indikas ke li vokis la helpon de sovetiaj trupoj. Sovetiaj tankoj invadis Budapeŝton kaj aliajn urbojn. La ribelantoj decide rezistis interalie per « Molotov-kokteloj » (brulboteloj, benzinbomboj) kontraŭ la tankoj. 2600 hungaroj kaj 700 sovetiaj soldatoj estis la viktimoj de ĉi tiuj bataloj, pli ol 200 000 hungaroj forfuĝis eksterlanden. Miloj da personoj estis arestitaj kaj centoj mortkondamnitaj. Sekvis periodo de severa subpremo kiu suferigis centmilojn da hungaroj dum multaj jaroj. Imre Nagy estis arestita kaj en 1958 okazis proceso en Budapeŝto. La 17an de junio la tuta mondo estis konsternita ekscii la ekzekuton de Imre Nagy kaj de liaj kamaradoj Pál Maléter, Miklos Gimes kaj József Szilágyi.

ONDO DE SOLIDARECO

La batalo de la ribelantoj kontraŭ la potenca Ruĝa Armeo kaj la konsciigo pri la mizera ekonomia situacio postmilita en Hungario

ekigis ondon de simpatio en Svisio, okazis protestmanifestacioj, materia helpo estis organizita kaj sendita tien kaj la fuĝintoj alvenintaj el aŭstria kampadejoj estis solidare akceptitaj. Post



kompreneblaj malfacilaĵoj en la komenco ili poste bone integriĝis en Svisio (kiel ekzemple ankaŭ la rifuĝintoj el Ĉeĥoslovakio en 1968). Favoris tion ne nur la malavara akcepto fare de Svisio, sed ankaŭ la ĝenerale bona profesia nivelo de la alvenintoj kaj la ekprospero de la svisa ekonomio. Ili miris pri la alta vivnivelo, sed tamen konsciigis ke oni devis streĉe labori kaj ke profesia kariero ne estis tiel rapida kiel ili imagis. Hodiaŭ oni ofte aŭdas la opinionon ke la iamaj rifuĝintoj el orienta Eŭropo iĝis pli svisaj ol la svisoj. Eble oni povus klarigi ĉi tiun fenomenon per komparo: itala aŭ hispana laboristo enmigrinta en la kvindekaj jaroj sciis ke li povis ĉiam reveni al sia devenlando, dum por la elmigrintoj el Orienta Eŭropo tio ne eblis dum jardekoj antaŭ la falo de la fera kurteno.

KOMPARO KUN LA HODIAŬA SITUACIO

Historiistoj volonte substrekas ke la helpopreteco rilate la rifuĝintojn el Orienta Eŭropo ne estis motivita per nura malavareco, sed ke aliaj faktoroj ludis rolon, ekzemple la disvastigita antikomunismo, la bezono de la ekonomio trovi laborfortojn kaj la volo de reparacio post la fermo de la limoj al rifuĝintoj dum la Dua Mondmilito. Hodiaŭ la situacio rilate rifuĝintojn kaj enmigrintojn kompreneble ŝanĝiĝis kompare kun tiu de la jaro 1956. Ĉi-jare la svisaj civitanoj akceptis en septembro pliseverigon de la leĝoj pri enmigrintoj kaj eksterlandanoj per popola referendumo. Oni adaptis ilin al la normoj de la Eŭropa Unio kaj ili devus eviti misuzojn. Fine de novembro denove okazos referendumo rilate la kontribuon de Svisio al la evoluhelpa fonduso por la 10 novaj EU-membroj orienteŭropaj (1 miliardo da svisaj frankoj por 5 jaroj). Kvankam la sindikatoj de la laboristoj kaj tiuj de la entreprenistoj estas por, la popolisma dekstro kontraŭas kaj la rezulto de ĉi tiu referendumo estas necerta.

(Riŝo 31227)



G. BATAILLE, NIETZSCHE KAJ LA FAŜISMO

Mordu ĝin! Mordu ĝin!
La kapon, tranĉu al ĝi la kapon!

Niĉeo, Tiel parolis Zaratuŝtro.


Homo estas profunda maro kie naĝas strangaj, buntaj estaĵoj. Frederiko Niĉeo kaj Georgo Batalo estas du filozofoj, kiuj pasie sondis tiujn homajn profundaĵojn. La unua provis kompreni la moralon por pli bone retaksi ĝin kaj liberigi la kreadokapablecojn de la individuo, repensi la hierarkion, la dua, kiu admiris Niĉeon, esploris la libidan ekonomion, la originojn de la religioj,.... Inter tiuj homoj stariĝas la malhela silueto de la fratino de Niĉeo kiu perfidis la filozofion de sia frato por nutri la nazian ideologion. Kiel malfari la fian laboron de tiu, kiun Niĉeo mem nomis "la pretendema anserino"? Batalo kaj kelkaj intelektuloj aŭ artistoj ŝiros la vualon de la faŝismo, kiu kripligis unu el la plej subtilaj sed ankaŭ potencaj, kompleksaj pensoj de la homaro. Por restarigi tian filozofion G. Batalo kaj liaj amikoj lanĉis neordinaran kaj avangardan revuon. Sed por bone kompreni la rolon de tiu revuo en la intelekta medio ni devos pli atente analizi la venenon kiun Elizabeta, la malbeninda fratino, lasis flui inter la vortoj de la germana filozofo kaj, fine, kompreni ke, se Niĉeo tute ne estas faŝisto, li ankaŭ ne estas maldekstra, progresema pensulo (laŭ la kriterioj de niaj nuntempaj demokratioj), kies filozofio ebligas diversajn interpretojn kaj tamen rezistas kontraŭ ĉiajn politikajn devojigojn.

La senkapa revuo

Georgo Batalo estas eksternorma verkisto, kiu havas apartan lokon en la franca kaj eŭropa literaturo. Mistikulo, li tamen fariĝas ateisto en 1922 kaj, la saman jaron, bibliotekisto en la Nacia Biblioteko de Francio. Li estos la aŭtoro de abunda verkaro ĉar li majstris diversajn disciplinojn kiel la poezio, la erotika literaturo, la filozofio, la etnologio, la sociologio,... Miskonata dum sia vivo, li malgraŭ ĉio multe influos la intelektulojn post la dua mondmilito ĝis nun. Lia verko karakteriziĝas per romanoj kies perforta erotismo aŭ vera pornografio kaŝas subtilan sentokapablecon, kompleksajn filozofiajn konceptojn kaj la vundojn de lia estinto (*Historio de la okulo, Mia patrino, La bluo de la ĉielo, ...*). Per ekstrema erotismo,

en siaj romanoj kaj sia vivo, Batalo celis ekstazon kiu obsedis lin de ĉiam.

Krom sia seksa vivo, certe pasiiga, Batalo kaj iniciataj intelektuloj fondis sekretan komunumon, kiu observis precizajn leĝojn kaj ritojn. Ekzemple, ili ne rajtis saluti kontraŭjudistojn kaj la renkontiĝoj sekvis la ritmon de la sezonoj. "Acéphale" (Senkapa) estis la nomo de tiu komunumo kiu inspiriĝis de la studoj de Marcel Mauss pri la afrikaj sekretaj societoj. Verŝajne fondita en 1937, la societo Acéphale estis mistika sed havis pli malpli publikan ekziston. Oni tiel nomis ĝin ĉar la membroj rifuzis ĉiajn ĉefojn. La "senkapeco" estos do esenca kondiĉo de la membroj por transformi la homaron. Iuj aspektoj de la societo ŝajnas nun ofte groteskaj. Ja, la membroj renkontiĝis nokte en maldensejo meze de arbaro kie troviĝis fulmobatita kverko. Sed, aliparte, kiel Batalo, la tuta grupo estis obsedita de la morto kaj Acéphale eĉ projektis oferi homojn laŭ obskuraj ritoj. Sed la membroj rezignis ĉar neniu deziris esti la ekzekutisto... Tiu stranga societo estas esenca por la franca kaj eŭropa niĉeismo.



Pri tiuj kunvenoj oni preskaŭ nenion scias. La kulto de la sekreto estas forta sed ŝajnas ke tiu epoko grave ĝin influis artistojnkaj elstarajn pensulojn kiel Michel Leiris, Michel Foucault, Jacques Lacan, Gilles Deleuze, kiuj duonvorte aludis sian partoprenon, simpation al tiu societo. Male, oni scias ke la membroj de Acéphale eldonis revuon: "La revue acéphale" (la senkapa revuo). La unua numero estis publikigita la 24-an de junio 1933. En januaro 1937, Batalo kaj liaj kunlaborantoj publikigas duan kaj lastan numeron tute dediĉitan al Niĉeo kaj

enhavas neeldonitan tekston de la germana filozofo pri Heraklito. Kiel mi skribos pli sube, la nazioj jam delonge provas subŝteli lian verkon profite al la faŝista ideologio. La entrepreno de Batalo estas do bonvena, aŭdaca kaj genia: savi Niĉeon! "Faŝismo kaj Niĉeismo kontraŭiĝas kaj eĉ perforte kontraŭiĝas ekde kiam unu kaj la alia estas konsideritaj en sia tuto: unuflanke, la vivo enĉeniĝas kaj stabiligiĝas en senfina servuteco, aliflanke ne nur blovas la libera aero, sed ekventego; unuflanke la ĉarmo de la homa kulturo estas rompita por lasi la lokon al la forto de la vulgaruloj, aliflanke la forto estas tragike dediĉita al tiu ĉarmo." La laŭdoj de Batalo pri Niĉeo estas oftaj en lia verko kaj li ne kaŝas la influon de la granda antaŭulo (*La interna sperto,...*).

Tamen, la artikoloj publikigitaj en tiu efemera revuo ne nur enhavas laŭdojn sed projekton por reale ŝanĝi la socion, malkovri novan subjektivecon, forpuŝi ĉiujn aŭtoritatojn, enterigi Dion. Oni ne povas klarigi ĉiujn detalojn, ĉiujn pensojn, tezojn, ideojn, kiujn la revuo enhavas aŭ la personecon de ĉiu intelektulo, kiu partoprenas al tia aventuro sed ĉefa principo distingiĝas: **Forigi ĉian aŭtoritaton**. La valoro de la artikoloj, la profundeco de la analizoj pri Niĉeo estas ĉiam aktualaj kaj la intelekta lukto de Batalo kontraŭ la faŝistoj estas ekzempla. Oni povas mediti tiun frazon: "La homoj ne scias libere kaj malŝpare ĝui de la Tero kaj ĝiaj produktoj: la Tero kaj ĝiaj produktoj malavare donacas sin kaj malmodere liberiĝas nur por detrui. La atoma milito, tiel kiel la moderna ekonomio ordonas ĝin, ankaŭ instruas pri la senco de la Tero, sed instruas ĝin al renegatoj kies kapo estas plena de kalkuloj kaj tujaj konsideroj, sen pasio kaj kun deprimiga furiozo." Oni ankaŭ povas aliloke legi: "Vivi, estas inventi!"

Indas noti ke Batalo verkis en pluraj revuoj (*La Socia Kritiko,...*) kaj, ĉiufoje, oni povas konstati lian sindediĉon al la lukto kontraŭ la faŝismo kaj iuj ajn totalismoj. Antaŭ la revuo *Acéphale* li ekzemple publikigis artikolojn en la marksista revuo *Contre-Attaque*. Li skribis: "Ni konstatas ke la naciista reago profitas, en aliaj landoj, de la politikaj armiloj kreitaj de la laboristaro.

Ni niavice celas uzi la armilojn kreitajn de la faŝismo, kiuj kapablis deturni la fundamentan aspiron de la homoj al ekzalto kaj fanatikismo. Sed ni asertas ke la ekzalto, kiu servos la universan intereson de la homoj devas esti senfine pli grava, potenca, de tute alia grandeco ol tiu de la naciistoj sklavigitaj al la socia konservado kaj egoistaj interesoj de la patrujo.” Batalo provis skizi psikologion de la faŝismo por pli efike batali.

Nur kelkaj vortoj pri la ilustristo, André Masson (1896-1987). Membro de la superrealista grupo ekde 1923, Masson eksperimentas la aŭtomatajn teknikojn, skribo aŭ desegno, kiuj estas unu el la grandaj direktoj de la movado, kiun A. Breton tiel difinis: *Psika aŭtomatismo[...]* diktita de la penso tute sen rego de la racio kaj ekster ĉiaj estetikaj aŭ moralaj zorgoj. Unuvorte, la malfermita pordo al la subkonscio. Talenta, Masson rapidege desegnas kaj oni povas konstati la potencon de liaj instinktoj kaj la subkonscio en la strekoj de liaj verkoj: *Mi komencas sen bildoj nek planoj en mia kapo, sed mi rapide desegnas aŭ pentras laŭ miaj impulsoj... Iom post iom, en la signoj, kiujn mi faras, mi ekvidas personaĵojn aŭ objektojn.* Masson grave influos la usonan abstraktan pentroarton.

La nazia anserino.

Elizabeta Forster-Niĉeo, la fratino de la aŭtoro de *Zaratuŝtro* estas la edzino de konvinkita kaj aktiva kontraŭjudisto, Bernhard Forster, kun kiu ŝi edziniĝas en 1884. La *Times* jam nomis lin “la plej reprezentanta ĉasisto de judoj el Germanio”. Niĉeo abomenis lin kaj ne ĉeestis dum la ceremonio. La kredo de la nova paro je la pureco de la germana raso kaj legado de libro de Richard Wagner, *Religio kaj Arto* (1880), inspiras al ili kaj aliaj germanoj la fondon de kolonio, la **Nueva Germania**, en Paragvajo. Ĝi estas absoluta malsukceso. La koloniistoj ne estas kapablaj kultivi la teron, mortas pro malsanoj kaj atakoj de bestoj. Ili ne eĉ kapablis malhelpi la mestizadon kun la indiĝenoj!* Bernhard Forster sin mortigas. Malgraŭ ĉio la malamego de Elizabeta kontraŭ la judoj restas sendifekta kaj ŝi certe trovos sian venĝon en la falsado de la verko de sia genia frato. En 1889 Niĉeo falas en la abismojn de la frezeneco. Lia cerbo iom post iom mortas. Elizabeta profitas de la situacio. Oni kondukas lin en la familian vilaon Silberblick en Weimar, kie pli kaj pli nombraj admirantoj de la filozofo povas viziti lian dormoĉambron gviditaj de Elizabeta. Tio ne devas kaŝi pli teruran

kaj obskuran taskon. Ŝi parte cenzuras “*Ecce Homo*”-n, la ĝenan membiografion de Niĉeo. Poste ŝi ankaŭ falsas la lastajn manuskriptojn de la filozofo kaj arigas la postmortajn aforismojn en ia ordo, kiu mallerte kongruas kun la nazia ideologio. La tasko estas tre malfacila ĉar, kelkajn jarojn antaŭe, ŝi mem konfesis al sia edzo



ke” *la celoj de mia frato ne estas la miaj. Lia tuta filozofio kontraŭas miajn konvinkojn*”. Ŝi devis ankoraŭ kaŝi la leterojn de la frato, kiuj ja estas sen ambiguecoj: *“Niaj deziroj kaj niaj interesoj tute ne estas komunaj, ĉar via projekto estas kontraŭjuda.”* Niĉeo en pluraj libroj aŭ leteroj ankoraŭ skribis: *“Ne frekventu personojn, kiuj partoprenas al la mensoga raso trompaĵo”* aŭ *“Kiu hatas la fremdan sangon aŭ malestimas ĝin, tiu ankoraŭ ne estas individuo sed speco de homa protoplasmato.”* Oni ankaŭ povas relegi lian korespondadon kun la naci-socialista deputito Theodor Fritsch pri kiu Niĉeo pli malfrue skribos: *“En Germanio, ne ekzistas pli malsingardema, kretena gento ol la kontraŭjudistoj”*. Sed, portempe, Elizabeta sukcese mistifikis ĉiujn. Hitler pozas en 1934 apud la busto de la filozofo. Ŝi akceptos lin en la arkivejoj dediĉitaj al sia frato la sekvantan jaron. Ĉu la kontraŭjudismo de la malnova eldonisto de Niĉeo, Schmeitzner, iumaniere helpis la projekton de Elizabeta Forster? Oni ne forgesu alian familianon de Niĉeo, Richard Oehlern, aŭtoro de pompa libro: *Niĉeo kaj la estonto de Germanio*, kiu provas paraleligi la verkon de Niĉeo kaj *Mein Kampf*. La falsado de la postmortaj skribaĵoj de Niĉeo ankaŭ multe helpis iujn influantajn ideologojn de la naci-socialismo kiel Alfred Bäumler por asimili, transformi la verkon de la filozofo. Iuj juĝistoj eĉ postulos la postmortan proceson de la heroldo de la “superhomo” en Nurembergo. Por konvinki vin ke lia filozofio estas tute fremda al la naziaj tezoj vi ekzemple legos la aforismon 475 de *Homa, tute tro homa*.

Pli intime, Niĉeo (38 jaraĝa) neniam pardonis al sia fratino la sabotadon de la rilato, kiun li travivis kun la bela kaj inteligenta Lou Andreas-Salome (21-jara). Ja, Elizabeta, helpe de ilia patrino, manipulis sian fraton kaj persvadis lin ke

Lou ne estas virino kiu konvenas al li. Niĉeo dubas kaj la paroloj de lia fratino sonas en la soleco de la filozofo. Lou Salome rifuzas geedziĝon. Niĉeo ne komprenas, grave deprimiĝas kaj, fine, li kverelas kun Lou (“*mia supernatura fratino*”) kaj sia (juda) amiko Paŭlo Rée. Kiam Niĉeo komprenas ke Elizabeta ankoraŭ mistifikis lin, Lou Salome jam estas malproksime. La kununiĝo de la du estaĵoj estas nur memoraĵo... Malgraŭ la pardonleteroj. Niĉeo idealigis tiun junulinon sen vidi ke, kiel li, ŝi estis terure sendependa. Kelkajn jarojn pli malfrue, Lou Salome verkos libron pri sia malnova amiko.

Niĉeo kaj la maldekstruloj

Frederiko Niĉeo ne estas viktimo. Male, lia tuta filozofio estas proceso kontraŭ la moralo de la viktimoj, la malfortuloj, t.e. la kristanismo, la naciismo kaj... la socialismo. Eĉ se oni foje devas konstati ian konfuzon, kiu ekzistas en lia filozofio pri vortoj kiel socialismo (“*religio de la kompato*”, laika kristanismo) kaj anarkiismo, Niĉeo ĉiufoje diagnozas nihilismon kaj hipokritecon de la komuna moralo, kiu pretendas celi la feliĉon de la plebo. Tamen, se ni legas pli atente la verkon de Niĉeo oni ankaŭ facile distingas gravajn, precizajn ideojn kaj, por miaj anarkiismaj legantoj, la similecojn kun la pensoj de Max Stirner estas oftaj. Niĉeo almenaŭ opiniis ke la anarkiismo antaŭenigis kuraĝulojn kaj li malofte sed klare interesiĝas pri sorto de la laboristoj aŭ forpuŝas salajrecon. Malgraŭ tio ni ne devas dubi pri la malestimo de Niĉeo kontraŭ la socialismo sed lia sinteno kontraŭ la religio, la burĝoj kaj, pli malprecize, la kapitalista ekonomio elmontras zorgojn pri socio, kiu falas en la abismon de la unuforma neboneco kaj memkontento de klasoj stultigitaj per la maŝinoj, la laboro, la pasio de la profito, la komforto, la naciismo aŭ la sensencaj esperoj pri sociala revolucio. SAT-anoj, ni vane serĉos komunajn celojn en tiu verko. Niĉeo malestimegas la demokration, la egalecon kaj abomenas la altruismon. Laŭ tiu filozofo, vi scias, de nia malsana civilizacio devas naskiĝi alia humana specio, kiu kapablos superpasi la nihilismon, nova raso, elektita, “*bredita*” por regi la Teron. Tiuj novaj homoj kapablos elteni ekstremajn vivkondiĉojn (la soleco, ekzemple), solvi novajn enigmojn kaj transformi la homaron ĉar ili estos artistaj tiranoj kaj ilia materialo estos la homo. Tiuj “superhomoj” estos preter Bono kaj Malbono, estos kapablaj krei novajn valorojn, civilizaciojn. Niĉeo (kiel Stirner, sed Niĉeo superpasas lin) laŭdas la individuecon sed ankaŭ la ekstremajn

diferencojn inter la homoj, la hierarkion kaj sanan egoismon. Tiel, li volas denunci la hipokritecon de la kolektivaj valoroj kaj kondutoj (moralo, Ŝtato, politiko, ...) kaj skizi sian propran etikon. Ĉiam miskomprenitaj, la ideoj de Niĉeo estis malpurigitaj de la nazioj kaj blinde kondamnitaj de nombraj "progresemluloj", ankoraŭ nun. Neniu komprenis ke lia filozofio ne reale situigis inter la ideoj de la 19-a jarcento sed trovis eĥon ĉu en la greka antikveco, ĉu eble en malproksima estonto.

Niĉeo estis unu el la filozofoj, kiuj plej grave influis la XX-an jarcenton. La listo de la artistoj aŭ intelektuloj, kiuj estis pli malpli fascinitaj de lia verko estas longa kaj prestiĝa: T. Mann, S. Zweig, Munch, G. D'Annunzio, A. Artaud, H. Hesse, H. Miller, A. Camus, P. Valéry, S. Kubrick... Pri politiko la afero estas multe pli malfacila. La niĉeana maldekstro kiu estis aparte aktiva en Germanio kaj Francio komence de la 20-a jarcento estas vera nebulozo sed oni tamen povas distingi gravajn personaĵojn. La angla historiisto Hinton Thomas ekzemple rimarkas ke Niĉeo precipe allogas la neortodoksulojn, kiuj ŝatas lian ofendemecon. Ili povas esti socialistoj, anarkiistoj, liberecanoj, feministoj aŭ dekstruloj (post 1918)! Tamen la socialistoj preterlasas lian kontraŭregarismon kaj ne volas, verŝajne, legi liajn aforismojn kontraŭ la socialaj aspiriloj... Tio, kio interesas ilin estas la dinamiko de la verko de Niĉeo, kiu instigas la homojn ĉiam senmaskigi ĉiajn ortodoksecojn kaj neŝanĝeblajn strukturojn precipe kiam socialismo ekhavas realan politikan potencon. Nombraj maldekstruloj, liberecanoj, marksistoj inspiriĝis de Niĉeo antaŭ forpuŝi lin. Oni povas, ekzemple, citi Georgs Lukacs, hungaran komuniston, kiu vigle atakis Niĉeon pri la "malracio" de lia verko kiu kondukus al naziismo. Lukacs tamen estis vitalisto kaj niĉeano dum sia junaĝo antaŭ verki libron, kiu estas vera gvidlibro de inkvizicio kontraŭ sia malnova majstro. Laŭ la aliaj marksistoj kiel Kurt Eisner (ankaŭ malnova niĉeano), la filozofo de Sils-Maria precipe estis la heroldo de la aristokrataj klasoj. Strangaj opinioj, kiam oni scias ke, inter 1897 kaj 1914, Niĉeo estis pli legita ol Markso en la laboristaj bibliotekoj de Leipzig, ekzemple! Iuj socialistoj, tute male, starigas Niĉeon kontraŭ konvencia marksismo. La radikala maldekstro germana vidas en la rusa revolucio la efektivigon de la ideoj de Betoveno, W. Whitmann (Vitman) kaj Niĉeo kaj preterlasas Markson, Engelson aŭ Leninon. Ankoraŭfoje, la socialistoj ŝatas la atakojn de Niĉeo kontraŭ la burĝoj. Oni ankoraŭ povas citi la influon

de Lily Braun, feministino, socialistino kaj niĉeano, kiu denunciis la regantajn klasojn sklerozajn. Ŝi fariĝos naciistino. En Francio oni konstataj similajn tezojn ĉe Charles Andler, Daniel Halévy kaj Georges Sorel. Oni ĉiam intence forgesas la niĉean kulton por la egoismo, k.t.p... Sed estas post la dua mondmilito ke aperas en Francio influaj intelektuloj kaj niĉeanoj. Mi jam citis ilin, temas pri Deleuze, Guattari kaj Foucault. Oni ne povas en tiu artikolo priskribi la eksterordinaran gravecon de iliaj verkoj, ve. Sed iuj socialistoj jam organizas sin kontraŭ la niĉeanoj. Luc Ferry, ridinda pensulo kiu fariĝos dekstrulo, kaj Alain Renaut vulgare kritikis Majon 68, Deleuze-on kaj la liberecanojn kiuj sekvas lin. La Francio de Mitterand viciĝas laŭ la usona moralismo de la 80-aj jaroj. Kurioze, oni ankoraŭ timas ke la niĉeanoj flirtas kun la naciista partio de J-M. Le Pen! Tiu fenomeno daŭras ankoraŭ nuntempe kaj mi eĉ povas konstati malagraban aĉigon de la filozofio de Niĉeo eĉ inter iuj artistoj, sen forgesi ke, en Francio, unu el la ĉefaj ideologoj de mastra sindikato, la MEDEF, estus fervora leganto de Niĉeo. **Konklude, ni nun kapablas aserti ke politiko estas triviala parolado de profesiuloj kiuj ne kapablas digesti pli delikatajn aŭ ampleksajn ideojn... Ankoraŭfoje, ŝajnas ke oni ne povas, hodiaŭ, politike utiligi la penson de tiu germana filozofo sen kripligi ĝin. Ni povas nur bedaŭri la forpason de homoj kiel Batalo aŭ Deleuze!**

Preskaŭ neniu komprenis ke Niĉeo persvadis sin ke distanco estas necesa inter la suferoj kaj esperoj de liaj "najbaroj" kaj la estonto de la homaro. Dank'al tiu distanco, diskreta sed fundamenta koncepto de lia filozofio, la libera homo povas kreski kiel rara planto kaj sperti "la nostalgion al la estonto". Tiu libera homo, pri kiu la filozofo dediĉis sian tutan vivon, bezonas vivi for de la venenaj muŝoj kaj priserĉi en si mem "la genion de la koro". De ĉiam fidela al tiu majstro de la skeptikismo mi esperas ke mi bone elmontris lian gravecon por la nuna mondo, antaŭenigis la respondojn kiujn lia verko proponas kontraŭ la naciismo, la fanatikismo, la reveno de Dio (katolika, juda aŭ muzulmana), la ekonomio kiu flirtas kun la nenieco, la valoroj kiuj ruiniĝas, la homaro kiu ankoraŭ ne havas sencon, orientiĝon kaj orienti la gekamaradojn al pli atenta legado de lia verko. Profunde influita de Niĉeo, mi ankoraŭ senlime fidas al ĉiuj homoj, kiuj luktas kontraŭ ĉiajn subpremojn. Li estas oceano en kiu mi ŝatas bani min.

Cirilo

* La kolonio ankoraŭ ekzistas. La genetikaj difektoj estas oftaj.



Ni legis por vi...

Kontraŭflue de Valo,



reeldonis SAT-broŝurservo, 2005, 84 paĝoj, prezo: 3€. En tiu ĉi libro, Valo rakontas sian vivon dum la unua mondmilito, inter 1914 kaj 1918. Li naskiĝis en 1900 en modesta laborista familio. Li estas la nura filo de la familio kaj li multe

amas siajn gepatrojn same kiel ili multe amas lin. Ekde la komenco de la milito, lia patro estas mobilizita ĉe la fronto. Dum la unuaj jaroj la patro sendas leterojn al sia familio por trankviligi ĝin kaj rehejmiĝas kelkfoje dum mallonga tempo okaze de forpermesoj. Tiel oni vidas la evoluon de la milito je diversaj niveloj kaj ankaŭ la rilatojn de Valo kun la kamaradoj en la lernejo kaj iliajn proprajn spertojn. Ni ankaŭ lernas pri la spirito de juna knabo kiu kreskas kaj evoluas dum malfacila epoko. Estas agrablstila libro facile legebla de ĉiuj.

Flora Markov

Aldone al la resumo de Flora, mi emas atesti, ke mi mem tre entuziasmiĝis ĉe la unua lego de ĉi-tiu libro, kiam mi estis samaĝa kiel la aŭtoro. Ĝi estas unu el la libroj, kiuj kontribuis fari el mi ĝisostan fanatikan esperantiston, klopodanta ĉiam pensi en Esperanto, kaj esperantigi eĉ la plej ekzotajn proprajn nomojn. Sed preter tiuj anekdotoj, mi tamen aldonu, el iom pli vasta perspektivo, ke tiu libro konsistigas tre valoran ateston pri la rigardo de juna laborista esperantisto, jam rimarkinde matura, pri kelkaj gravaj tiutempaj eventoj, kiaj estis la morto de Zamenhof, la ribelo de la francaj soldatoj en tranĉeoj dum printempo 1917, kaj la rusa revolucio kelkajn monatojn poste. Aparte precize kaj trafte estas priskribitaj la naciismaj artifikoj, kiuj tiutempe estis uzitaj por sendi milojn da homoj al buĉejo. Nekonantoj de Valo sciu ke li estis sudfranca esperantisto, naskiĝinta en 1900 kaj mortinta en 1996, kiu, ĉefe ekde 1960, abunde provizis la laboristan esperanto-literaturon per multaj tradukitaj kaj originalaj tekstoj, beletraj, politikaj aŭ popolsciencaj, plejparte eldonitaj de la broŝurservo de SAT. Intimulo de Rajmundo Ŝvarco, kies verkojn li ilustris, kaj de Lanti, li certe estis unu el la plej gravaj SAT-aŭtoroj dum la lastaj jardekoj. Do novuloj, ne mistrafu la okazon konatiĝi kun liaj verkoj!

Vinko Markov

Ĵus aperis en Francio

PIRENEOJ 1940 LASTFINA LANDLIMO

Internacia kolokvo - Universitato de Pau (Po) kaj Adour (Adur)
- regionoj - Antaŭparolo de Christian MÄNSO (Kristja Maso)

Tri destinoj, tri verkoj tipaj de la penso komence de la XXa jarcento, kiuj venis trovi finon piede de Pireneoj, "La lastfina landlimo" kiu pro diversaj kialoj baris al ili la vojon de libereco, en la ŝtormego de historio, dum la Dua Mondmilito.

Walter Benjamin (Valter Benjamin), Carl Einstein (Karl Ajnštajn), Wilhelm Friedmann (Vilhelm Fridman), tri germanaj judoj farintaj Franclandon sia elektpatrujo, intelekta kaj sentimenta, longe antaŭ ol kreskis naziismo, mortigis sin respektive en Port-Bou (Por-Bu), Betharram (Betaram) kaj

Bedous (Bedus). Filozofo, arteoriisto, lingvisto, verkisto, "engaĝiginta" intelektulo, ĉiu markis sian epokon per la forto de sia penso, per sia kreemo kaj sia ĉeesto sur la tiuepokaj decidfrontoj.

La tekstoj en ĉi tiu volumo kunigitaj prezentas tiujn tri rimarkindulojn* pri kiuj temis kolokvo kaj ekspozicio en Pau (Universitato kaj Interkomunuma Biblioteko) en 2003.

Walter Benjamin (1892-1940) aŭtoro de "l'origine du Trauerspiel allemand" (La origino de la germana Trauerspiel), "L'oeuvre d'art à l'ère de reproductibilité technique" (La artverko en la tempo de teknika

reproduktebleco), "Passages parisiens" (Parizaj "pasejoj")**).

Carl Einstein (1885-1940) aŭtoro de "La sculpture nègre" (La negra skulptarto), "L'art du XXème siècle" (La arto de la XXa jarcento), Georges Braque (Ĵorĵ Brak).

Wilhelm Friedmann (1884-1942) eminenta lingvisto, profesoro pri franca literaturo ĉe la Universitato de Leipzig (Lepsiko), poste profesoro ĉe la Altstuda Lernejo en Parizo, post 1933.

Liliane Meffre (Liljan Mefr)

Ŝtatkortino, germanistino kaj historiistino pri arto.

Profesorino ĉe la Universitato de Dijon (Diĵo).

Noto de la tradukinto (M.Th. Lloancy): du vortoj en la franclingva prezentoteksto kaŭzis problemojn, pri kiuj ni diskutis kun Luis Lera, aktiva membro de la Asocio Carl Einstein - François Mazou, Combattants de la Liberté (C.E. Frasia Mazu, Batalintoj por Libereco):

* "personalités": povas signifi la karakterojn de tiuj tri viroj, sed ankaŭ ties rimarkindecon; por eviti la konotaciojn de "eminentuloj", ni preferis la bazon "rimarkind-" kaj simple donis al "-uloj" la signifon de "karakteroj";

** "passages": temas unue pri, konkrete, kovritaj stratoj en Parizo; sed verŝajne, pli larĝe, ankaŭ pri lokoj ebligantaj pason, transpason... de diversspecaj "limoj".

ISBN: 2-296-00703-1 - Prezo: 19,50 € - 216 paĝoj.




PAC-AGADO Pacista Frakcio de SAT

Lastmomento :

Mallonga informo pri la pafaĵojetoj el bomboj.

Francio rifuzas malpermesi la pafaĵojetojn el bomboj



Francio, kiu prezidis de la 7-a ĝis la 17-a de novembro 2006 en Ĝenevo (Svislando) la trian konferencon de UNO pri la ekzameno de iuj armiloj, kontraŭis al pluraj landoj (1), kiuj volas malpermesi la uzadon de pafaĵojetoj el bomboj.



Freŝdata raporto de Internacia Handikapo aperigas ke 98% de viktimoj de pafaĵojetoj estas civiluloj. Francio nur petas ke la ŝtatoj purigu, post la milito, la poluitajn zonojn pro la pafaĵojetoj el bomboj kaj disŝutitaj sur grundo. Francio ankaŭ proponas teknikan plibonigon de pafaĵojetoj por ke ĉiuj eksplodu kiam ili tuŝas grundon. Kiam UNO mem alvokas provizore interrompi la uzadon de pafaĵojetoj el bomboj, Francio rifuzas eĉ diskutadon pri la temo. Internacia Handikapo kaj aliaj membroj de CMC (Monda Koalicio kontraŭ la pafaĵojetoj el bomboj) malaprobas la starpunkton de Francio.

La landoj, kiuj volas malpermesi la uzadon de pafaĵojetoj el bomboj estas :

Argentino, Aŭstrio, Kostariko, Ĉeĥio, Danlando, Germanio, Vatikano, Hungario, Irlando, Liĥtenŝtejno, Luksemburgio, Meksiko, Nov-Zelando, Portugalio, Slovakio, Slovenio, Hispanio, Svedio, Svislando, Peruo, Bosnio-Hercegovino, Grekio, Malto, Litovio.

(La franca deputito François Rochebloine komunikis al ni tiujn informojn)

Colette Weiss / André Weiss (2006/11/17)





KIO ESTAS JUZEN ?

Ĝi estas tekniko por tinkturado ekde ĉirkaŭ la jaro 1700. Oni tinkturas pentrante desegnitajn bildojn rekte sur blanka silko per farbopeniko. Blanka silko funkcias kiel kanvaso. Kiam oni vestas Juzenan kimonojn, kvazaŭ oni vestas pentraĵojn. Por eviti malbelan miksaĵon de koloroj, anticipi antaŭ pentrado kun koloraĵoj, oni protektas ĉiujn ĉirkaŭojn de pecoj de desegnaĵo per amelo. Kiam ŝtofo estas lavita post kolorigado, linioj kiuj estis kovritaj de amelo restas blankaj, kaj klare estiĝas kvazaŭ blanka fadeneto. Ĉi blanka linio "Itome" karakterizas Juzen. Ĉi tiu metodo de tinkturado origine venis el Ĉinio.

Juzen estas evoluinta en kelkaj urboj en Japanio. Baza tekniko estas komuna, tamen laŭ urboj, gusto de desegno, koloro kaj rafinado estas iomete malsamaj. Ekzemple Juzen de Kioto estas luksa kaj pompa desegnoplana kun brodornaĵo kun pecoj de oro, pro tio ke la klientoj estis aristokratoj kaj potencaj komercistoj tie. Kontraste, klientoj en Kaga (malnova nomo de urbo Kanazawa) estis samurajaj familianoj, kiuj preferis ne tro pompan sed ŝikan.

Tial Kaga-Juzen estas pli ŝika kaj ne tiel pompa kiel tiu de Kioto. Temo estas ofte naturaj floroj kaj pejzaĝoj. En tiuj desegnaĵoj tute ne temas pri politikaj aŭ socialaj aferoj.

KAGA-JUZEN EN MODERNA EPOKO

Post samuraja epoko, kio okazis al Kaga-Juzen?

Tiam kemia materialo por tinkturado estas inventita. Epoko eniras en amasfabrikadon. En Kanazawa, kiel produktejo de silko, moderna tinkturado kaj teksado evoluis. Konsumantoj de Juzen ŝanĝiĝis el samurajaj familioj al riĉaj komercistoj. En drasta ŝanĝo de industrio, Kaga-Juzen malprosperis. Senĉesa interna konflikto de juzenejoj helpis ĝian malprosperon.

Plejpartaj metio-laboristoj estis idoj de kamparaj malriĉuloj. Ili, laborante, kunloĝis kun dunganto. Ĉiuj en industrio devigis al si memlerni teknikon en severa

laboro, observante aliajn. Neniu preparis sistemon por lernado. Rezulte, homoj, kiuj povas atingi sufiĉe altan teknikon estas tre malmultaj. Plie, socia pozicio de metiistoj estis tre malalta en Japanio. Mankis al ili kaj ekonomia forto kaj spirita libero. Ankoraŭ nun tiu tendenco estas plejparte tenata en kampo de juzen-produktado. Antaŭ kaj dum milittempo, industrio preskaŭ pereis ĉar belaj vestadoj estis malpermesitaj. Post milito ĝi denove ekaktivis.

INTERNA PROBLEMO DE LA INDUSTRIO

Juzen, se ĝi heredis ortodoksan metodon, estas ne taŭga por amasfabrikado. Ĝuste tial, ankoraŭ nun ĝi estas daŭre altekosta specialaĵo, kiun nur malmultaj konsumantoj povas aĉeti. Cirkulada sistemo plie instigis tiun karakteron. Kiel?

Por atingi aĉetanton, estas tre longa "vojaĝo".

metiistoj -> loka pogrando -> granda urba pogrando -> alia loka pogrando --> loka vendisto -> konsumanto

Estas ne malofta afero, ke dum tiu vojaĝo prezo 10-obliĝas kompare al neta prezo.

Lokaj pograndoj, precipe en Kaga, havas grandan povon kontraŭ metiistoj. Multaj implicitaj permesoj ekzistas en ĉi tiu malgranda industrio. En la industrio, metiistoj (krom Juzenistoj, kiuj desegnas kaj pentras, estas ankaŭ alispecaj metiistoj ekzemple riparistoj, kudristoj ktp) ĉiam timas senigon de laboro. Ĉiuj metiistoj ne esprimas sian opinion. Ili estas ĉiam manipolataj de pograndoj. Malbone por ili, metiistoj neniam solidarecas, neniam interŝanĝas informojn, male ili fintas reciproke. Ekzistas asocio de Juzenistoj, tamen ĝi ne funkcias por komuna profito de tuta industrio. Iuj metiistoj diras :

"Ĝi funkcias ne por membroj. Ĝia ĉefa funkcio estas teno de malmultaj potencaj Juzenistoj, kaj ilia subpremo de multaj aliaj. Ni, ĝeneralaj metiistoj eĉ ne povas ricevi informon pri subvencio de registaro.



Tiu ŝtofo fariĝos suba parto de kimono.

Sed sen agnosko de la asocio, ni ne rajtas nomiĝi Kaga-Juzenisto aŭ ricevi mendon".

FINIĜIS JAM "BONA EPOKO"

Ekonomia supreniranta ondo komenciĝis en 1970 kaj pinto estis en 1990. Kvankam situacio de ĝeneralaj Juzenistoj estas daŭre ne bona, almenaŭ siatempe kimono kaj aliaj Juzenaj objektoj estis bone venditaj. Tamen post malprogreso de ekonomio, klimato draste ŝanĝiĝis. Ili estas ne plu bone vendataj.

Silenta sekvo de pogrando kaj potenculo ne plu garantias sekuran vivon al metiistoj, kvankam alimaniere agado riskas al ili perdon de malmultiĝinta laboro. Sed iomete ĉi tiu malbona ekonomio efikas kiel liberigo al metiistoj. Ĉar pograndoj diras al metiistoj: "Ni ne povas doni al vi mendojn kiel antaŭe. Vi mem klopodu serĉi vian vojon, ne nur apogu vin sur pograndoj."

KION PENSAS PARTAJ METIISTOJ?

En tia kriza tempo, plej multaj juzenistoj ankoraŭ laboras tradiciastile. Tamen partaj liberemuloj komencas pli liberajn kaj unikajn laborojn paralele...

Pli liberaj kaj diversaj desegnoj

Tradicie desegnoj devis esti naturoj lokaj. Ĉefaj kombinoj de koloroj estis ankaŭ preskaŭ decidataj. Novaj provo-uloj, parte konservante tiun tradicion, samtempe

Sennaciulo, decembro 2006

liberigis sin el tia devigo. Ili ekenkondukas pli kaj pli diversajn temojn kaj esprimojn.

Ne nur por kimono

Juzen tekniko provas adaptiĝi al diversaj aliaj varoj: Sakoj, kurtenetoj kaj fulardoj. Povas esti ankaŭ roboj. Lastjare kiel unua provo, hulahula svindanca grupo enkondukis Kaga Juzenan robon. Desegno de Havajaj floroj sur silko tre bele brilis en lumo sur scenejo.

Ĉu eblas rekta vendado?

Tiu ĉi demando memorigas al ni "justan komercon". Malgraŭ ke ilia vivnivelo estas pli alta ol tiu de metiistoj en tiel nomataj 3aj landoj, ekonomia strukturo estas simila. Kaj pograndoj kaj firmao de komerca komisia agento grandigas distancon inter produktanto kaj aĉetanto. Ĝi foje funkcias kiel bona partnero, tamen ofte ne. Kiam ni konsumantoj aŭdas pri pagita prezo al produktinto, kompare de nia aĉetprezo, ni miras ofte, precipe pri metiistaj laboristoj.

Unu Juzenisto diras: "Mi estis arta metiisto, kiu povas pentri bele por iu speciala homo, fiksigardante ties karakteron. Tamen nunaj kaj estontaj juzenistoj celu pli vastan kreaĵon, ne limigante sin nur al kimono. Ni invitu diversajn homojn ĝui bonecon de Juzen."

...Por realigi ĝin, certe nekredeble alta prezo devas esti ŝanĝota estonte. Despli ke ĝi estas alta ne pro neta prezo (produktokosto), sed pro la komerca sistemo, kiu malfeliĉigas metiiston kaj aĉetantojn. Tio ĉi estas unu versio de ankaŭ nova ekonomia ŝanĝemo.

Se vi havas intereson pri ĉi tiu belarta metio, ne restu nur en miro kaj sopiro. Eble ĝi povas esti pliatingeblaĵo, se multaj homoj klopodas atente rigardi strukturon malantaŭ la beleco, kaj provi proksimiĝi al metiistoj, ne nur atendante ĝian vendon laŭ tradicia "longa vojaĝo".

Kio estos okazonta al ĉi tiu malnova metio? Kiaj estas aliaj metioj en via najbareco? Eble vi trovos ion, kio estas okazanta en ĉi sama epoko, per komparo de ili kun ĉi tiu ekzemplo.

Viola (Kanazawa, Japanio)

La procedon de Kaga-Juzen bonvolu vidi en la paĝoj 175 kaj 176.

Sukcsan 2007 deziras al vi la aktuala Redakcio

Unu bildo, unu artistino

LA SEKRETA TAPETPAPERERO



sendepende de nacieco kaj religio.

Wallpaper (tapetpapero) RFGA estas pentrita kaj brodita teksaĵo por kiu la artistino uzas tradiciajn teknikojn. Unuavide, nenion distingas tiun ĉi verkon de kutima brodaĵo farita de metiistino. Tamen, se vi rigardas pli atente la reproduktaĵon, vi ekvidos malantaŭ la floroj interplektitajn fadenojn per kiuj desegniĝas erotika kuniĝo de du virinoj.

Ghada Amer tiel kreas estetikon, kiu malkaŝas la tabuon de la ina samseksemo preter la tradiciaj atributoj kiuj difinas la rolon de virino en la socio muzulmana... aŭ en tute alia socio.

Ghada Amer kreas arton kiu emfazas la intimecon.



Cirilo



Kotizoj 2007

Lando	valuto	kotizo + abono
Argentino	€	27
Aŭstralio	€	52
Aŭstrio	€	52
Belgio	€	52
Bosnio-Hercegovino	€	8
Brazilio	€	22
Britio	GBP	35
Bulgario	€	12
Ĉeĥio	€	20
Ĉinio	CNY	45
Danio	€	52
Estonio	€	10
Finnlando	€	52
Francio	€	52
Germanio	€	52
Hispanio	€	40
Hungario	€	12
Italio	€	50
Israelio	€	32
Japanio	JPY	8400
Kanado	CAD	79
Koreio	€	33
Kroatio	€	12
Latvio	€	10
Litovio	€	10
Malagasio	€	3
Nederlando	€	52
Norvegio	€	52
Pollando	€	12
Portugaliao	€	30
Rusio	€	10
Serbio-Montenegro	€	10
Slovakio	€	12
Slovenio	€	12
Svedio	€	52
Svisio	CHF	90
Ukrainio	€	10
Usono	USD	70
Dumviva memreco	€	1300
Aliaj nemenciitaj landoj		
Eŭropo	€	33
Cetero de la mondo	€	20
Abono por nemembroj	€	57

LANDAJ PERANTOJ

Argentino : Rodolfo Calogero, Namuncura 1749, AR- Q 8302 AOW Neuquen.

Aŭstralio: Bernie Heinze, 1 Marne Rd., Mount Evelyn, Vict.-3796. Reto: <franciska@bigpond.com>

Aŭstrio : Vakas

Belgio : Jacques (Jakvo) Schram, 49 Hoffer Bekestraat, BE-2018 Antwerpen. Reto: jakvo <jakvo@mac.com> ,Poŝtkonto: 000-1692025-54

Bosnio-Hercegovino : Ivica Horvat, Žrtava faŝizma 1/IX, BA-71000 Sarajevo. rete: <ivicah@isinter.net>

Brazilio : José Joaquin Lunazzi, rua Manoel Antunes Novo 668, BR-13084-157 Campinas-SP. Reto: <lunazzi@uol.com.br>

Britio : Arturo Prent, 7 Walton Gardens, Hutton, Brentwood, Essex, CM13-1EJ (Tel.:+44.1.277.22.8 9.62) Reto: <arturo@signalprent.demon.co.uk>

Bulgario : Ivanka Stojanova, P.O.Box 701, BG-9000 Varna. Rete: <ivanka_esperanto@abv.bg>

Ĉeĥio : Vaclav Stiburek, J. Franka 1731, CZ-25601 BENEŠOV, rete: <stiburek.v@seznam.cz>

Ĉinio : Wang Tianyi, Xi'an Esperanto-Asocio, Jian-Gong-Lu 8 hao, CN-710043 Xi'an. Tel:0086-29-2242215, fakso: 2622952, Rete: <esp@pub.xaonline.com>

Danio : Ulrik Rasmussen, Nørregårdsvej 66, DK-2610 Rødovre.

Estonio : Freed Neeme, Kooli 6-26, EE-2240 Kehra.

Finnlando : Vakas

Francio : Pierre Quillaud, 16 rue du Lt.-Vaisseau Paris, FR-76120 Le Grand Quevilly, p@k.-SAT Peranto n° 17 333 10 N, Paris. Reto:<quillaud.p.mt@wanadoo.fr>

Germanio : Jiri Proškovec, Heimbau Str. 10, DE-44143 Dortmund, Konto ĉe NetBank, PLZ:200 905 00, Kto N°82 79 292. Reto: <proskovec@yahoo.de>

Hispanio : Pedro Sanz Sanz, C/Mar de Fora 13, esc.izq.,3-B, ES-28400 Collado Villalba. Konto: 0227-0001-85 0200526929 elektronika banko BBVA.

Reto:<pmariass1@mi.madritel.es>

Hungario : Béla Kovacs, Béla kiraly u.-44, HU-7400 Kaposvar. Ĝirkonto 11773432-04632175. rete: <espbel@axelero.hu>

Italio : Carlo Bourlot, Via Quarello 40, IT-10135 Torino (TO) Tel: 011-3970477 (vesp. ĝis 23h), Poŝtbanka konto n° 43976158. rete:<c.bourlot@libero.it >

Izraelio : Jehošua Tilleman, 97-A, Dereh-Akko, IL-26373 Kirjat-Mockin.

Japanio : Hiroyuki Tani, Syonai-Higasimati 3-4-2, JP-561 Toyonaka-si.-Pĉk.-00980-9-37624, SAT-Nihon. Reto: <tnhryk@pop07.odn.ne.jp>

Kanado : Hans E. Ilginis, 810 Dunsmuir Cr. Ladysmith, B.C. V9G 1N7, Kanado, bankkonto: Sennacieca Asocio Tutmonda CIBC, transit 540, Account n° 0747831; Rete:<hans@nanaimo.ark.com>

Koreio: Choi Manwon, P.O.Box 18, Guang-Ĵu, KR-501-012 Seoul

Kroatio : Zdenka Svetličić, Matoševa 6, HR-10410 Velika Gorica, rete: <sat_hr@yahoo.com>

Latvio : Margarita Zelve, Rupniecibas 35+13, LV-1045 Riga-45

Litovio : Gražina Opulskiene, Tylioji 32-22, LT-5503 Mažeikiai, rete:<grazopul@yahoo.com>

Malagasio : Justine (Lala) Ralalarisoa, Lot IIC-72-FD Manjakaray, MG-101 Antananarivo. Bankkonto: Ralalarisoa Justine, n° 010594738020000 BNI-CL 101 Antananarivo.

Nederlando : Corrie Kwantes-Kooij, Marnixstraat 57, NL-2023 RB Haarlem, pĉk. 2853752.

Norvegio : Per Engen, Østregate 14, H0203, NO-2317 Hamar.

Pollando : Elzbieta Janusz, ul.-Krowoderska 74/3, PL-31-158 Krakow, Bankkonto : BPH III O/Krakow 71 1060 0076 0000 3000 0177 7438

Portugaliao : Manuel Luis Pedrosa Alves, Estrada Principal n° 79, PT-2710 -413 Morelino-Sintra. Rete: <manuelalvespedrosa@clix.pt>

Rusio : Nikolao Gudskov, a/k 57, RU-105318 Moskvo, Reto: <nikolao@orc.ru>

Serbio : Ivan Močilnik, Požeška 132, SCG-11030 Beograd.

Slovakio : Miro Zavodsky, Juraja Zavodského 67, SK-01004 Zilina-Zavodie.

Slovenio : Vakas

Svedio : Inga Johanson, Stampgatan 60.B.-127, SE-411 01 Göteborg, pĉk.-SAT c/o I.-Johanson, n°-26-63-22-7. Rete: <sat_sverige@yahoo.se>

Svisio : Richard Schneller, Höhenstrasse 1 b CH-9302 Kronbühl, poŝtkonto: 25-158577-1, Rete:<rischneller@gmail.com>

Ukrainio : Dmitrij M.-Cibulevskij, a/k 10939, UA-61003 Ĥarkiv-3

Usono : Vakas

Krom al la perantoj oni povas pagi al:

Poŝtkonto de SAT: n° 1234-22 K, Paris.

Internacie:

IBAN: FR 77 30041 00001 0123422K020 39

BIC: PSSTFRPPPAR

aŭ

al la konto de SAT ĉe UEA: **satx-s**

El la SAT-sidejo
67 avenue Gambetta
FR-75020 Paris

Grava atentigo !

Tio estas la lasta numero kiun vi ricevis, se vi ne pagis vian kotizon por 2006!
Vi ja ricevis ĝin dum la tuta jaro - senpage !

DUMVIVAJ MEMBROJ DE SAT

Sekve de nia invito en aŭgust-septembra numero de Sennaciulo, jenaj gekamaradoj iĝis dumvivaj membroj de nia Asocio :

32785 François DEGOUL
34507 Franciska TOUBALE
35501 J.M. SALGUERO (Kani)
35584 Carmen CIDONCHA
32319 Pierre GROLLEMUND
35793 Stephane HERVE
33475 Lorenzo NOGUERA SARASA
24707 Gisèle MICHAUD
33402 Jean Jacques HIBLOT
32805 Roger HARDY

POR ŜTOPI LA BREĈON

F. Gullmarstam 380,00 SEK; anonime 1000,00 €; anonime 10,00 €; A. Huberdeau 100,00 €; Jarlo Martelmonto 2250,00 SEK; SLEA 2750,00 SEK; Savignat-Belhoté 3,00 €; G. Conche 100,00 €; G. Mickle 33,00 €; C. Levesque 50,00 €; Gao Mingsi 450,00 €.

POR NE FORGESI
PAGU VIAN
KOTIZON 2007
TUJ !

Sennaciulo, decembro 2006

HISTORIA JUSTECO EN HISPANIO

La Historio revenas al la aktualaĵo kaj al la politika debato en Hispanio. Diversaj cirkonstancoj konverĝis por ke la memoro

memoroj povus igi demandi sin pri la rolo de multaj povuloj, inter kiuj grava parto de la armeo. Do, se ne en la libroj, almenaŭ



Elfosado de postmortaj restaĵoj de nombraj viktimoj de Hispana civila milito

pri la okazintaĵoj de la 30aj jaroj troviĝu en la centro de la atento en la hispana socio.

Unue, oni devas rememori ke fine de la 30aj jaroj okazis sovaĝa intercivitana milito, iniciatita de grupo de generaloj kiuj renversis la respublikan reĝimon. Dum preskaŭ 40 jaroj nur unu flanko de la historio povis sin elmontri: la venkintoj malhelpis ĉian manifestiĝon de la memoro de la venkintoj, kaj konsideris nur sian version prava. Ne estas mirinde ke dum multaj jaroj la ĉefaj fontoj por studi tiun periodon venis el eksterhispanaj historiistoj: Gabriel Jackson, Hugh Thomas, Pierre Vilar, Herbert Southworth, Stanley Payne, ktp. Aliflanke, la timo instaligis en la koroj, kaj tre malmultaj homoj de la venkita tendaro kuraĝis rakonti al siaj idoj kaj proksimuloj sian veron. Eĉ la filoj timis.

Post la morto de la diktatoro, la historiografiaj malhelpoj malaperis, kaj la universitataj fakultatoj pleniĝis de libroj kaj artikoloj pri tiu periodo, dum novaj profesiaj historiistoj klopodis aliri la faktojn kaj analizi la kaŭzojn kaj konsekvencojn de la fenomeno. Sed la personaj memoroj ne ĉiam malfermiĝis: la hispana socio preferis rigardi antaŭen, kaj ne malfermi malnovajn vundojn, kiujn oni konsideris propraj de la pasinteco. Ankaŭ la timo rolis, oni ne kaŝu tion: eble la malfermo de la konkretaj

en la socio vidiĝis ia forgeso pri la pasintaj bataloj, kaj ne estas strange ke la partioj kaj asocioj kiuj pli insistis en sia ligiteco kun la antaŭaj tempoj estis konsiderataj kadukaj, kaj ne akiris apogon en la socio.

Tio eble estis konvena decido, aŭ eble simple necesa, sed lasis konsekvencojn negativajn. Unue, oni ne sufiĉe studis la personajn kulpojn de multaj povuloj, kio malhelpis la senton pri justeco en la socio. Due, oni ne sufiĉe atentis la personajn travivaĵojn de la viktimoj, ĝis la grado ke, por montri ekstremajn ekzemplon, oni ĝis nun ne esploris la entombigan lokon de multaj respublikanoj murditaj dum la subpremado dum la milito kaj eĉ en la tuj postaj jaroj. Samtempe, restas ankoraŭ en la hispanaj stratoj multaj simboloj de la antaŭa reĝimo, multaj dokumentoj estas ankoraŭ nealireblaj, kaj parto de la konsekvencoj (murdoj, senproprigoj, misfamigoj) restas nekorektataj.

Tio ŝanĝiĝis iom post iom en la lastaj jaroj. La unua kaŭzo, laŭ mia takso, estas simple generacia: granda parto de la malnovaj partoprenantoj en la plej gravaj okazaĵoj iom post iom malaperas, kiel ankaŭ la filoj, sed aliflanke alvenas al la maturiĝo tria generacio kiu ne plu estas persone implikita, kaj ne plu spertas la timon kiu bremsis iliajn praulojn, sed deziras

koni la veron de la suferoj de siaj avoj. Kelkfoje tio ŝuldiĝas al scivolo, sed ankaŭ al solidareco kun tiuj homoj al kiuj oni sentas sin iel ligitaj ne nur familie. Bona ekzemplo de tio estas la nuna ĉefo de la hispana registaro, José Luis Rodríguez Zapatero, kiu plurfoje montris publike sian ligitecon kun sia avo, kapitano de la armeo, kiu preferis resti fidela al la respubliko kaj estis murdita de siaj propraj kunarmeanoj. Similan ekzemplon montris la iniciatintoj de kampanjo por la eltrovado kaj elfosado de tombejoj, kie estis anonime kaŝitaj, ofte en apartaj lokoj aŭ en komunaj fosaĵoj, multaj viktimoj de la venĝo de la venkintoj en urboj kaj vilaĝoj laŭlonge de la tuta hispana teritorio, kaj kiuj ĝis nun restis neesploritaj.

Koincidis krome la foresto de la timo al la malfermo de personaj vundoj, dum oni pli preferas pensi pri ĝenerala studo de la historiaj cirkonstancoj.

Probable ankaŭ kontribuis al la serĉo de la vero, la malfermo de historiografia debato. Se dum multaj jaroj, kiel dirite, la historiistoj entreprenis seriozan laboron de esplorado pri tiu periodo, kun la sekvo ke la ĉefaj informoj kaj analizoj estas sufiĉe objektivaj establitaj, de antaŭ kelkaj jaroj triumfis en la librovendejoj kaj kioskoj aro da publikigaĵoj, verkitaĵoj ĉefe ne de historiistoj, sed de ĵurnalistoj kaj publicistoj, kiuj renaskigis la tezojn de la frankista historiografio, baze kulpigante la



respublikon kaj la respublikistajn fortojn pri la eĥo de la civila milito. Tiuj tezoj estas konataj al multaj legantoj de "Sennaciulo", ĉar ili estis vaste publikigitaj en konata de ni revuo, nome, en "Kajeroj el la Sudo". Tiu

reveno de la negaciistaj fortoj, dezirantaj pravigi la ribelintojn kaj celantaj eĥon en la aktuala politika debato, okazigis reagon en diversaj intelektaj medioj, kiuj montris ilian ligitecon kun la malnovaj pravigoj de la epoko de la diktaturo.

La debato koincidis dum tiu ĉi jaro 2006 kun la 70a datreveno de la komenco de la milito, kaj la 75a de la proklamo de la Respubliko. Kun tiu okazo, la hispana Parlamento decidis konsideri tiun ĉi la “Jaro de la Historia Memoro”, kun aprobo de ĉiuj politikaj grupoj krom la opozicia Popola Partio. La registaro proponis Leĝon pri tiu memoro, kiu ankoraŭ ne estas aprobita, kaj kiu estas kritikata de ambaŭ flankoj: de dekstre ĉar la opozicio akuzas ĝin je revenĝemo, kaj de maldekstre, ĉar multaj konsideras ĝin tro timema kaj nesufiĉa. La pinto de la kunmemoro estos Kongreso de historio organizita dum la monato novembro de la Ministerio de Kulturo, por prezenti la lastajn sciencajn studojn pri la Civila Milito.

Ankaŭ en la sino de la esperanta movado la ĝenerala iniciataro povas esti okazo por kunmemoro de la pioniroj de nia lingvo en Hispanio. Ni ne devas forgesi ke la hispana esperantismo, ĉu laborista ĉu neŭtrala, atingis sian pinton dum la 30aj jaroj, kaj ke la milito okazigis enorman perdon en la movado. Multaj esperantistoj perdis sian vivon aŭ devis ekziliĝi pro sia rilato al diversaj progresemaj movadoj. La nova reĝimo ne rekte persekutis Esperanton, sed ĝi malamike sintenis al ĝi, ĉar ĝi konsideris ĝin kiel lingvon de framasonoj kaj anarĥiistoj, tiel ke aliaj homoj kiuj restis en Hispanio ĉesis sian agadon favoran al nia lingvo, aŭ estis ĉikanataj diversmaniere. La laborista movado, kiel tia, absolute malaperis. Ankoraŭ nun dum nia informa laboro ni trovas multajn homojn kiuj referencas al la esperantisteco de siaj avoj, kaj foje eĉ surpriziĝas ke la movado ne malaperis.

Tial, mi mem, kun aliaj nunaj esperantaj aktivuloj, proponis ke nia movado profitu de la ĝenerala elano favora al la remalkovro de la historiaj radikoj, por entrepreni esploradon de la historio de la movado. Unufanke, tio havas la riskon ke kelkaj homoj ankoraŭ ligu Esperanton kun la pasinto, sed aliflanke oni povas montri al la ekstera socio la ligitecon de nia movado kun la socia realo. Sed ĉefe, tio estas maniero omaĝi tiujn homojn kiuj multe suferis pro siaj ideoj, kaj kiuj povas taŭgi kiel ekzemplo kaj instigo por ni ĉiuj.

Toño del Barrio, 35522.

ESPERANTO EN LA KONGRESO PRI LA CIVILA MILITO

La Kongreso pri la Civila Milito kiu disvolviĝis en Madrido fine de novembro, organizata de la hispana Ministerio de Kulturo pritraktis la rolon de Esperanto dum tiu armita konflikto. La subskribinto, Toño del Barrio, kune kun la konata historiisto Ulrich Lins, prezentis al la scienca komitato proponon pri komunikado pri “La rolo de Esperanto dum la hispana intercivitana milito”, kaj tiu ĝin aprobis.

La komunikado faras resumon de la diversaj rilatoj kiujn nia lingvo havis kun tiu historia momento. Unue, per la partopreno de diversaj esperantistoj en gravaj eroj de la milito, kiel la fama rolo de Julio Mangada, kiu tiam estis prezidanto de la Hispana Esperanto-Asocio, en diversaj militagoj komence de la konflikto, kaj ankaŭ per la partopreno de esperantistoj en la Internaciaj Brigadoj kiuj venis el diversaj landoj por subteni la Respublikon. Ni referencas al la novaĵoj pri esperantistaj taĉmentoj, kiuj poste montriĝis neekzaktaj.



Español \ English

Ni sekve pritraktas la rolon de Esperanto en la propaganda kaj ideologia batalo dum la milito. Diversaj instancoj kaj asocioj eldonis publikigaĵojn en Esperanto, favore al siaj tezoj. Ĉiuj ili apartenis al la respublikana flanko, ĉar la esperantistoj favoraj al la ribela flanko (kiuj ja ekzistis, kaj ne neglekteble) ne sukcesis konvinki siajn generalojn pri la taŭgeco de Esperanto. Ni ankaŭ pritraktas en tiu kunteksto la polemikojn kiuj disvolviĝis ene de la lojala tendaro, ĉefe en la debato pri la konveno profiti la militon por disvolvi revoluciajn agadojn, aŭ, male, koncentriĝi en la milita agado, evitante la malunuigon de la respublikanaj fortoj. En tiuj polemikoj havis sian rolon SAT kaj la hispanaj SAT-anoj, kiel oni povas sekvi en la tiamaj paĝoj de “Sennaciulo” kaj en la diskutoj de la roterdamo Kongreso de SAT.

Fine, ni pritraktas la konsekvencojn de la milito sur la hispanajn esperantistojn, inklude de la diversaj persekutoj suferitaj flanke de la nova reĝimo. Eĉ se Esperanto ne estis rekte malpermesita, kaj, kiel dirite, ekzistis esperantistoj kun influo en la frankista tendaro, estas klare ke nia lingvo, kaj aparte la laborista movado, suferis gravan damaĝon, kaj ke multaj samideanoj suferis pro sia ligiteco al niaj idealoj.

Sume, ni esperas ke tiu ĉi estis bona okazo por informi la ĝeneralan publikon pri nia historio, kaj por rememori la kamaradojn kiuj portis la torĉon de Esperanto dum tiu tragika periodo.

Toño del Barrio



1. Desegna plano : Juzenisto

Plani por tuta desegno. Ĉefaj Temoj por desegnoj estas pri lokaj aferoj. Ĝia naturo, kulturo, kaj malnovaj rakontoj. Estas 2 tipoj de desegno.

- 1) Desegno kiu fariĝos unu pentraĵo kiam ŝtofo estos fasonota en formo de kimono.
- 2) Desegno kiu jam aspektas kompleta en formo de ŝtofo. La tipo 1 estas ĉefa tendenco de Kaga-Juzen. Kiam iu vestas ĝin, ĝi aspektas tiel kvazaŭ tiu vestas pentraĵon.


2. Portempa fasono : Fasonulo

Fasoni ŝtofon en formo de kimono portempe. Por marki lokojn sur ŝtofo parton de posta kuniĝo.

3. Subdesegno : Juzenisto

Meti blankan silkon sur desegnitajn paperon.

Kopii desegnaĵon sur silkon per suko de blua floro (komelino). Komelino estas anticipe ensorbata en papereton. Juzenistoj uzas tiun sekigitan. Tranĉante la papereton ete, kun akvo en broso fandante prenas bluan koloron. Komelino estas facile malaperigebla per akvo, tial tre taŭga por kopio de desegno sur silko antaŭ ortodoksa pentrado.



4. Disetendado : Juzenisto

Elprenas fadenon el kimone formita ŝtofo.

Sekve de malantaŭo streĉe disetendadi ĝin sur bazo, kiu estas anticipe preparita per maldikaj bambuaj bastonoj.

Elasteco de bambuo tre taŭgas por etendigi. Por labori sur ŝtofo, ĝi devas esti streĉita.

5. Metado de "Itomenori" (Fadena amelo) : Amelisto/foje Juzenisto

Sur komelina lino, meti amelon elpremante el tubo. Alta tekniko necesas ĉar amelo ŝanĝiĝas delikate laŭ temperaturo kaj

humideco. Ĝia tradicia materialo estas rizo. Por tre maldika linio nur kemia amelo taŭgas. Senhalte fari linion premante tubon estas malfacila. Amelo rolas kiel moleo, kiu evitigas metotajn kolorojn malbele miksiĝi. Post ĉio la amelo estos forlavota. Bonfareco de amelado estas ŝlosilo de sukcesa laboro.



6. Fiksado de amelo : Amelisto / foje Juzenisto

Post amelado, malsekigi ŝtofon per broso ensorbigita de akvo aŭ fabo-supo. Tuj poste, sekigi ŝtofon per fibro.

- 1) Malaperigi linion faritan de komelino,
- 2) Ensorbigante fiksi amelon sufiĉe bone en ŝtofan fibron,
- 3) kutimigi bone kun koloraĵoj. Silko estas proteino, kiu elvenis el bombisko, same kiel fabo-supo. Tial supraj efikoj aperas.



7. Pentrado : Juzenisto

Pentrante kolorigi ŝtofon rekte en partoj ĉirkaŭitaj de linioj per diversaj brosoj. Acidecaj tinkturaĵoj kaj rektaj tinkturaĵoj estas uzataj.



(Al juzenistoj kiuj havas specialan labortablon, disetendado ne necesas.)



8. Antaŭvaporizo : Vaporejo, mendate de tinkturisto

Vaporizante fiksi pentritan koloraĵon al ŝtofo. Por eviti sorbon de koloro en sekvanta etapo: kovrado.





9. Kovrado : Vaporejo, mendate de tinkturisto

Surplenigi malmolan rizan amelon sur kolorigitajn partojn. Gardi pentraĵon antaŭ tutŝtofa tinkturado. Kavoj kaj eniro de aero inter amelo kaj ŝtofo estas severe malpermesata.



10. Ŝtofa tinkturado : Tinkturisto

Tinkturi per granda broso sur tuta ŝtofo, rapide fari por ke ne aperu malegalaĵoj. Ĉi tiu laboro delikate dependas de humideco kaj preforteco. Alta tekniko necesas.



11. Vervaporizo : Vaporejo, mendata de tinkturisto

Post tuta sekiĝo de ŝtofa tinkturaĵo, meti ŝtofon en vapor-keston kaj vaporizi ĝin dum kelkdecaj minutoj. Vervaporado efikas al koloraĵo fiksiĝi en ŝvelitan fibron.

12. Akva lavado aŭ seka lavado : Tinkturisto

Forlavi amelon kaj troan koloraĵon. Post forlavado, aperas blanka cxirkaŭa linio, kiu estis kovrita de amelo. Tio estas la karakterizaĵo de Kaga-Juzen. Kiam kemia amelo estas uzata, lavado estas farata per seka lavado.



13. Senakvigi : Tinkturisto

Sekigi ŝtofon atentante ne okazigi faldaĵojn, nek makuli koloron.

14. Ordigi fibron per vaporaĵo :

Vaporejo, mendate de tinkturisto
Almetante vaporaĵon etendigi ŝtofon.
Ordigante fibron, refari sur ŝtofo antaŭan vastecon.



15. Ĝustigi koloron finlaborante : Kolora ĝustigisto

Specialisto, kiu traktas adapton de tinkturado. Poste ankaŭ posedantoj konsultas tie, kiam ili havis makulon sur kimono. Ĝustigisto estas specialisto pri agordado.

16. Portempa postfasono : Fasonisto

Por vendi al klientoj montrante desegnon, fasonisto portempe fasonas en formo de kimono. Kiam aĉetanto estas decidanta, tiam li pliĝustigas la kimonon laŭ ĝia grandeco.

